
ISSN 2072-5825

# Espero Katolika

**2020 - CENT DEK JAROJ DE INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA FONDITA EN PARIZO EN LA JARO 1910**




**Tuŝapude de la Baziliko de Montmartre okazis en la centjara datreveno de la fondo de I.K.U.E. en la jaro 2010 la 63-a Kongreso de I.K.U.E.**

**Numero 10-12/2020**

**Oktobro-Decembro 2020**

JARKOLEKTO 117 - N. 1191-1193 - Oktobro/Decembro 2020

***Sur la kovrilo:*** Baziliko de Sankta Koro de Jesuo en Montmartre en Parizo

## ENHAVO


| | |
|---|---|
| DISTRIĜEMO POVAS KONDUKI AL PERDO DE LA KREDO | 51 |
| REVENIGI LA CENTRAN LOKON EN LITURGIO AL DIO | 52 |
| PRI SIGNIFO DE LA DANKEMO EN LA VIVO DE LA HOMO | 53 |
| POR ENPENSIĜO - PLANO DE SATANO | 55 |
| KOVIM NUDIGIS NIAN MANKON DE KREDO | 56 |
| KIO ESTAS FELIĈO? | 57 |
| PREĜO POR MALRIĈECO KAJ HUMILECO | 58 |
| DEK JAROJ POST LA GRANDA JUBILEO - LA CENTJARIĜO DE I.K.U.E. | 59 |
| VIRTUALAJ TAGOJ DE I.K.U.E. - 14.-21.8.2020 | 60 |
| KIU ESTAS JESUO POR MI | 61 |
| LA KVINA TELERO | 62 |
| ĈEESTU, FIDULOJ, ĜOJE TRIUMFANTAJ (kanto) | 64 |



**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>

**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

**UEA-konto “ikue-v” * Banko:** “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio

tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E**.
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Pavol Petrík - **Ĝenerala Sekretario/ Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak

# DISTRIĜEMO POVAS KONDUKI AL PERDO DE LA KREDO

***Alparolo de la papo Francisko antaŭ Anĝeluso la 12-an de julio 2020, la placo de s-ta Petro en Vatikano***



Karaj gefratoj, bonan tagon!

En la evangelio de tiu ĉi dimanĉo (komp. Mat 13,1-23) rakontas Jesuo al granda homamaso – por ni ĉiuj bone konatan – parabolon pri semanto, kiu dissemas grajnon sur kvar diversaj specoj de grundo. La Vorto de Dio, simbolizanta per la grajno, ne estas abstrakta Vorto, sed Kristo mem, la Vorto de la Patro, kiu en sino de Maria fariĝis korpo. Tial akcepto de la Dia Vorto signifas akcepton de la Persono de Kristo, de Kristo mem.

Ekzistas diversaj manieroj de la akcepto de Dia Vorto. Ni povas agi kiel vojo, kien tuj alflugas birdaro kaj la grajnojn bekmanĝas. Tio estas distriĝemo – granda danĝero de nia tempo. Multe da entrudemaj paroloj, ideologioj kaj eblo de la senĉesa distriĝo hejme eĉ ekstere povas konduki al forgeso de emo de silento, koncentriĝo kaj dialogo kun Sinjoro ĝis tiu grado, ke minacas perdo de la kredo, neakcepto de la Vorto de Dio, dume ni vidas ĉion kaj ĉio mondeca nin forkondukas.

Plua eblo estas akcepti la Dian Vorton kiel ŝtonozan grundon havantan malmulte da humo. La grajno tie rapide ekĝermas, sed ankaŭ rapide sekiĝas, ĉar ĝi ne sukcesas enradikiĝi. Tio estas bildo de tiuj, kiuj la Dian vorton akceptas kun momenta entuziasmo, sed kiuj estas supraĵaj, tial do la Dia Vorto ĉe ili ne asimiliĝas. Se poste dumvive ekaperas malfacilaĵoj, sufero kaj konfuzo, tia malforta kredo neniiĝas ĝuste kiel semo, kiu falis inter ŝtonojn.

Ankaŭ povas esti, kio estas la tria eblo, pri kiu Jesuo parolas per parabolo, akcepti la Dian Vorton kiel grundon, sur kiu kreskas vepro. Kaj dornoj prezentas riĉecon, sukceson kaj mondajn zorgojn. La Vorto iom elkreskas, sed ĝi sufokiĝas, malfortiĝas kaj forvelkas, ĝi ne donas utilon.

Kaj fine la kvara eblo: ni povas la Vorton akcepti kiel bonan grundon. Tie kaj nur ĉi tie la grajno enradikiĝas kaj alportas utilon. La semado, kiu falas sur tiun ĉi fekundan grundon, prezentas tiujn, kiuj aŭskultas Vorton, akceptas ĝin, zorgas pri ĝi kaj praktikadas ĝin en la ĉiutaga vivo.

La parabolo pri la semanto estas tiel iome „patrino“ de ĉiuj paraboloj, ĉar ĝi parolas pri aŭskultado de la Vorto. Ĝi memorigas al ni, ke la Dia Vorto estas grajno, kiu estas fekunda kaj efikanta en si mem. Kaj Dio ĝin malavare dissemas ĉie, sen strebi ĝin ŝpari. Tia estas la koro de Dio! Ĉiu el ni estas grundo, sur kiun falas grajnoj de Vorto, neniu estas ekskludita! La Vorton ricevas ĉiu el ni. Ni povas demandi: kia speco de la grundo estas mi? Ĉu mi similas al la vojo, ŝtonoza tereno aŭ vepro? Sed se ni volas, ni povas iĝi bona grundo, kulturita kaj zorgeme kultivita, por ke ni ebligu al la grajno de la Vorto maturiĝi. Ĝi jam estas ĉeestanta en nia koro, sed ebligi al ĝi, ke ĝi alportu utilon, dependas de ni. Dependas de la maniero de la akcepto, kiun ni por tiu ĉi grajno rezervas. Ofte ni estas distriĝemaj per multaj interesiĝoj, per multaj referencoj, kaj estas malfacile inter tiom da voĉoj kaj vortoj distingi tiujn de la Sinjoro,


kiu unusola nin liberigas. Tial estas necese alkutimiĝi aŭskulti la Dian Vorton kaj ĝin legi. Per tio mi denove revenas al la konsilo, ke vi kunportadu malgrandan evangelion, poŝeldonon, en la poŝo aŭ teko. Kaj ĉiutage vi legu la fragmenton por alkutimiĝi la Dian vorton bone kompreni, kian grajnon Dio proponas kaj ke vi pripensu, per kia grundo vi ĝin akceptas.

La Virgulino Maria, la perfekta modelo de la bona kaj fekunda grundo, helpadu nin per sia preĝo fariĝi volema grundo sen vepro kaj ŝtonoj, por ke ni povu alportadi bonajn fruktojn al ni kaj al niaj gefratoj. ■

## REVENIGI LA CENTRAN LOKON EN LITURGIO AL DIO

### Kardinalo Roberto Sarah

***La Eŭkaristio devas denove fariĝi centro de nia vivo kaj Dio centro de liturgio – emfazas kardinalo Robert Sarah, prefekto de Kongregacio por Liturgio kaj Sakramentoj. En interparolo por semajngazeto Famille chrétienne li konstatas, ke bedaŭrinde la nuntempa liturgio estas ofte ia spektaĵo.***



Sacerdoto ne plu celebras oferon de Kristo, sed gvidas iun renkonton inter geamikoj. Se ni elpensas proprajn, kreivajn liturgiojn, minacas tio al ni, ke ni falos en kulton de pure homa naturo, respondanta al niaj sopiroj kaj al aktuala modo, kaj la kredantoj kaŭze de tio malproksimiĝas de tio, kio estas fonto de la vivo – diras la kardinalo Sarah. La Eŭkaristio – li aldiras – estas por kristano la demando de la vivo aŭ morto. Se do en la centro de liturgio troviĝas homo, ankaŭ la Eklezio iĝos nure homa organizo, kiu estos monduma, kiel ofte avertas papo Francisko. Sed se male en la centro troviĝas Dio, la Eklezio akiras vitalecon – certigas ĉefo de la vatikana oficejo por liturgio.

Laŭ kardinalo Sarah estas necese hodiaŭ sur la kampo de liturgio fari certan inverson. Estas por tio necesa reflekso, formacio kaj reveno al konciliaj tekstoj. La kardinalo Sarah proponas, ke mi la inverson komprenu laŭvorte. Estas necese en ĝin engaĝigi ankaŭ nian korpon, por ke ĝi esprimu direktigon de la liturgio al Dio. Tiucele povas plej bone servi turniĝo de la tuta kredantaro kaj la mescelebranto samdirekten. Tio ne koncernas tion, ĉu la sacerdoto staras turnita al la kredantoj dorse aŭ frunte, sed temas pri tio, ke ĉiuj estu kune turnitaj direkte de apsido, kiu simbolas Orienton, do Dion.

La kardinalo Sarah emfazas, ke tiel celebrata liturgio akordiĝas kun litero kaj spirito de la koncilio. “Kiel prefekto de Kongregacio por Liturgio kaj Sakramentoj mi volas memorigi, ke la mescelebro ’ad orientem’ estas permesita en rubrikoj de meslibro, kiuj precizigas, kiam la mescelebranto sin turniĝadu direkten al homoj,” diris la kardinalo Sarah. Li memorigis, ke jam pasintjare oficiale li instigis sacerdotojn kaj kredantojn, por ke ili almenaŭ dum iuj partoj de la liturgio, kiel estas akto de pentesprimo, Gloro kaj eŭkaristia preĝo, ĉiuj kune sin turnu orientdirekten. ■

*Radio Vatikana, 29.05.2016*

# PRI SIGNIFO DE LA DANKEMO EN LA VIVO DE LA HOMO

Estas tre grave lerni vivi kiel dankemaj homoj. Maria el Nazareto estas por ni ekzemplo de la dankado kaj glorado de Dio. Malgraŭ tio, ke Ŝi travivis vivon persekutata, nekomprenata, la vivon plenan de doloroj, Ŝi kapablis jubili: Mia animo laŭdegas la Sinjoron! Ĝuste tial, ĉar Ŝi sin fordonis al la Sinjoro. Kaj en tiuj ĉi dolorplenaj momentoj Ŝi vivis en sinfordonemo kaj konfido al la Sinjoro, ĉar ŝi sciis, ke la Sinjoro ĉion transigos je bono, eĉ se ŝajnas, ke ĉio al Li elglitis el la manoj.

Se ni ekrigardas la forpasintajn jarojn de la aperoj de la Virgulino Maria, la Reĝino de la Paco, kaj ĉion, kion Ŝi diris al ni dum tiu tempo, ni vidas kiel ofte Ŝi parolas pri dankemo. Ĉiu ŝia mesaĝo finiĝas: „Mi dankas al vi, ke vi akceptis mian alvokon.“

Ni memorigu al ni iujn ŝiajn dankvortojn, kiuj eliris el ŝia koro: „Hodiaŭ mi ĝojas kaj dankas al vi pro la preĝoj. Ĉisemajne estu por vi dankado pro ĉiuj gracoj, kiujn Dio donis al vi!

Hodiaŭ mi dankas al vi pro ĉiu malfermo de viaj koroj kaj pro ĉiuj preĝoj! Mi volas danki al ĉiuj, kiuj akceptis mian mesaĝon. Mi dankas al vi pro la amo, kiun vi esprimas al mi.

Ankaŭ hodiaŭ mi dankas al vi pro ĉio, kion vi dum tiuj tagoj por mi faris! Precipe al vi, karaj infanoj, ennome de Jesuo mi dankas pro oferoj, kiujn vi travivis dum ĉi tiu forpasinta semajno.

Karaj infanoj, vi forgesas, ke mi de vi postulas oferojn, por ke mi helpu al vi kaj forpelu de vi satanon.

Preĝu, por ke via vivo estu ĝoja dankado, kiu elfluos el via koro, kiel rivero de la ĝojo.

Infanoj, danku senĉese pro ĉio, kion vi havas, pro ĉiu donaceto, kiun Dio donis al vi, por ke tiel de Dio sur vin descendu ĝoja beno.

Al Dio danku, ĉar ĉio estas por vi donaco de Dio. Tiel vi dum la vivo povos dankadi pro ĉio kaj trovadi Dion en ĉio. Ĉiu tago estu plenigita per danka preĝo al Dio pro vivo kaj pro ĉio, kion vi havas.“



La plej malbona kaj plej danĝera manko de homo estas maldankemo. Esti dankema signifas esti inklina al la novaj vivebloj. Vi mem al vi vivon ne donis, ĉio, kion vi havas, estas donacita al vi el Ĉielo. Ĉiu momento de via tago, nova semajno, monato eĉ jaroj de via vivo estas donaco elĉiele. Vi ne povis mendi al vi gepatrojn, vi ne antaŭmendis al vi naturon, en kiu vi vivas, korpon, en kiu vi estadas. Ĉion vi ricevis. Ĉu vi iam dankis Dion, ke Li ĉion ĉi tion donacis al vi kaj enkondukis vin en la vivon?

Dankema estas tiu homo, kiu rimarkis, ke liaj tagoj kaj lia vivo dependas de Dio. Dankema estas tiu, kiu konvinkiĝis, ke homo pli multe vivas el tio, kion li ricevas, el tio, kion li faras. Homo verdire vivas tiom, kiom li dankemas.

Homo estas estulo, kiu ne vivas el si mem. Li vivas el alio. El aero, kiun li spiras, el akvo, kiun li trinkas, el nutraĵo, kiun li manĝas, el homoj, kiuj lin akceptas, el laboro, kiun li faras. Senĉese li estas referencita al tio ekster si mem, al alia homo, tute li estas dependata de aliulo, li ne povus vivi sen aero, kiun li ne produktas, sen akvo,

kiun li ne kreas, sen manĝaĵo, por kiu li devas penadi, sen homoj, sen kiuj li ne povus esti tiu, kiu li estas.

Al ni tio ŝajnas esti tute evidenta. Tion ni ne pripensas.Nur en ekstremaj vivsituacioj ni komencas konsciiĝi, kiel grava estas por ni tio, je kio ni senĉese estas dependaj. Se malpuriĝas aero, ni restas sen akvo, ni manĝas putrajn manĝaĵojn, homoj ofendas nin... Nur tiam en ekstremaj situacioj ni rimarkas, kiel grava estas por ni tio, pri kio ni kutime eĉ ne ekpensas.

Kaj kio se tio estas simila ankaŭ rilate al Dio? Ĉu Dio estas por ni antaŭkondiĉo de tio, ke ni vivu kaj estu?

La kredanta homo estas dankema. Estas li homo, kiu vidas kaj ekkonas, ke Dio estas baza antaŭkondiĉo de tio, ke ni vivu. Dio estas tiu, kiu en sia mano tenas ĉiun nian paŝon eĉ homhistorion.

La dankema homo ne estas blinda, li vidas. Li vidas mondon eĉ objektojn tiel, kiel ili estas. La dankema homo estas tiu, kiu senĉese lernas, kiu ĉion atentas, kiu kapablas miri. Dankemaj homoj estas homoj de granda koro, humilaj kaj bravaj. Ili scipovas repaciĝi, pardonpeti, ili kapablas kompreni, rigardi mondon per pli klara vido, ili kapablas bruligi lumon, kie estas tenebro. Ili kapablas haltigi miltojn.

Jesuo estas por ni modelo de la dankema homo. Kiam Veronika donis al Li vualtukon, por ke Li viŝu sian ŝvit- kaj sang-kovritan vizaĝon, Li al ŝi redonis bildon de sia vizaĝo kaj igis ŝin famekonatan. Dum jarmiloj ŝi estas rememorata kiel virino, kiu helpis Jesuon. Nur dankemuloj iĝas famkonataj. Maldankemuloj restas en malgloro, solecaj, tiuj jam estas mortaj. La dankemuloj kapablas donadi, ĉar ili konstante estas havantaj.

Al naŭdekjarulo, kiu en Italio transvivis kronviruson, estis donita kalkulo por uzado de respiratoro, 500 eŭroj por ĉiu tago. Li enpensiĝis. Kuracisto demandis lin, ĉu li kapablas tion pagi. Ne – respondis maljunulo. Nur mi primeditas. Jam naŭdek jarojn mi senpage spiras aeron kaj ĉiam mi konsciiĝas, ke tio estas donaco, por kiu mi al iu neniam devas pagi.

Dum ni nenion perdas, restas sen iu aŭ io, ofte ni tion eĉ ne rimarkas. Pri multaj korporganoj ni eĉ ne scias, ke ili ekzistas, ĝis ni sentas ilian doloron. Ni ne zorgas pri ilia bonstata tenado kaj sana vivo, ĝis ne aperas doloro...

Povi spiri sen aparato, manĝi per propraj dentoj, trinki sen angieto en nazo, ekpromeni kiam ajn mi volas, ĝui sunon, aeron, maron, birdpepadon kaj florojn, printempon kaj vintron, pluvon kaj venton... tio estas donacoj. Ekzistas tiom da beleco, kiu nin ĉiutage duonblindigas kaj ni ĝin eĉ ne rimarkas.

Ni povas malbeni situacion, kiu trafis nin, rifuzadi ordonojn de institucioj, kiuj plenumas sian laboron, ni povas krii, sed ni ne povas ŝanĝi situacion. Sed per ĝia akcepto ni povas ion lerni. Ni povas komenci observi vivbelecon. Ekkonsciiĝi kiel multe ni fakte estas feliĉaj. La feliĉo ne dependas de la eksteraj kondiĉoj, packontraktoj kaj monrimedoj en banko. La feliĉo estas stato de la spirito.

Donaco estas libero de kredkonfeso eĉ de konscienco, libero de vorto, paco en patrujo... eblo viziti preĝejon, partopreni la sanktan meson, pekkonfesi...

La donaco estas papo, episkopo, sacerdoto, monaĥo, monaĥino... Nur, kiam ni restos sen ili, ni rimarkas, ke ni fare de ili estis pridonacitaj. Danke al morto ni komencos konsciiĝi, ke ankaŭ vivo estas donaco. Ekde infanaĝo oni demandis nin, kiam ni ricevis iun donacon: „Kion oni diras?“

Mi bedaŭras nekredantojn. Ili ne havas al iu diri dankon pro la travivita belo. La preĝo ŝprucas el koro plenigita de troaĵo da dankemo. La preĝo estas malkovro per kiom da donacoj ni estas superŝutitaj. Eblas esti feliĉa eĉ dum kvaranteno. Eĉ en izolejo, eĉ sur hospitala lito, eblas esti plenigitaj per dankemo. Preĝi ĉiuloke. Familio estas eta eklezio. ■

*Katekizo de sac. Ljubo Kurtović, Meĝugorje 2020*

# POR ENPENSIĜO - PLANO DE SATANO

Satano kunvenigis tutmondan demonaron. En sia enkonduka alparolo li diris:

„Ni ne povas al kristanoj malebligi, ke ili vizitadu preĝejon. Ni ne povas malebligi al ili, ke ili legu Biblion kaj ekkonadu veron. Ja eĉ ni ne povas malebligi al ili, ke ili ekligu intiman rilaton kun sia Savinto. Ni do lasu ilin, ke ili vizitadu preĝejon. Sed ni senigu ilin de ilia tempo, ke ili ne havu tempon kreadi rilaton al Jesuo Kristo. Ĝuste tion mi de vi postulas“, diris diablo. „Ni malebligu al ili, por ke ili ne estu ligitaj kun sia Savinto kaj dum la tuta tago ili ne konservadu tiun ĉi vivodonan kuniĝon!“

„Sed kiel ni tion faru? demandis liaj demonoj.

„Klopodegu, ke ili senĉese estu okupitaj per diversaj aferoj kaj elpensu multajn eblojn, kiel okupigi ilian menson,“ respondis diablo.

„Tentu ilin, ke ili malŝparu, malŝparu kaj malŝparu kaj prunteprenadu monon. Konvinku iliajn virinojn, ke ili vizitadu laborlokojn kaj tie ili pasigu multan tempon, kaj ke viroj laboru ses aŭ sep tagojn dumsemajne, dek ĝis dek du horojn tage, ke ili povu al si permesi vivi malplenan vivon. Malebligu al ili pasigi tempon kun infanoj. Kiam iliaj familioj disfalos, tiam preskaŭ ne plu ekzistos en iliaj hejmoj evito antaŭ laborstreso! Senĉese ataku ilian menson, ke ili ne aŭdu tiun mallaŭtan, diskretan voĉon. Loginstigu ilin, ke ili dumvojaĝe senĉese havu funkciigitan radioaparaton aŭ magnetofonon, ke ili senĉese havu hejme funkciigitan televidilon, diskludilon kaj komputilon, kaj zorgu pri tio, ke en ĉiu vendejo kaj restoracio senĉese ludu la profana muziko. Tio tute okupos ilian menson kaj interrompos ilian interligon kun Kristo.

Atentu, ke ili havu sur tabloj dum kafotrinko multajn revuojn kaj gazetojn. Dudek kvar horojn ĉiutage ataku iliajn cerbojn per raportoj. Dum ŝoforadoj ilin ĝenadu per avizotabuloj.

Plenigu iliajn interretajn poŝtkestojn per sensencaĵoj, varkatalogoj, prognozoj kaj diversvariaj novaĵoj kaj per ofertoj de prezreduktoj de varoj, senpagaj servoj kaj falsaj ŝancoj.

En gazetoj, revuoj kaj en televido senĉese montradu belajn sveltajn modelulinojn, por ke iliaj viroj komencu kredi, ke la plej grava estas ekstera belo kaj ke ili komencu esti malkontentaj pri siaj edzinoj.

Klopodu, ke la edzinoj estu tro lacigitaj por ne povi nokte ami siajn edzojn. Aldonu al tio al ili ankaŭ kapdoloron! Kiam ili ne donos al siaj edzoj la bezonatan amon, ili ĝin komencos serĉi alie. Tio iliajn familiojn rapide disrompos. ■



## PREĜO AL ĈEFANĜELO MIĤAELO

Sankta Ĉefanĝelo Miĥaelo, defendu nin en batalo. Ŝirmu nin kontraŭ malico kaj insidoj de diablo. Dio ordonu al li, humile ni petas; kaj vi, princo de la ĉiela armeo, ĵetu satanon kaj la ceterajn malbonajn spiritojn, kiuj trairadas la mondon por pereigi animojn, per Dia potenco en la inferabismon. Amen.

# KOVIM NUDIGIS NIAN MANKON DE KREDO

## Vatican News: Komentario Eklezio kaj Mondo
## Carmelo Ferlito - Kuala Lumpur, Malajzio

Periodon de Kovim-19 oni memorigados kiel unu el la plej komplikaj periodoj, se temas pri individuaj liberecoj, precipe pri la libereco religia. Per senprecedenca maniero estis kredantoj de la tuta mondo devigitaj submetiĝi al decido ne povante partopreni diservojn. Ĉio okazis sen iu ajn provo trovi iun kompromison inter necesegaj sekurigoj malebligantaj disvastigon de la nova virozo kaj defendo de la baza rajto de la religia praktikado. Ĉie en la mondo estis preĝejoj kaj aliaj konstruaĵoj de la religia kulto tiuj lastaj lokoj, kiuj estis denove viziteblaj de publiko.

En Malajzio ankoraŭ hodiaŭ (la 21-an de julio 2020) la religia sfero daŭre frontas restriktojn, kvankam la vivo jam tute revenis en nornalan situacion. Por eksterlandanoj ekzistas malpermeso de eniro en la lokojn de la religia kulto, kvazaŭ ili aŭtomate estus alportantoj de la viruso. En katolikaj preĝejoj plu ekzistas limigita nombro de la ĉeestantoj kaj draste estas reduktata nombro de diservoj.

Ne surprizas, ke registaroj de la tuta mondo eluzas ĉiun okazon por limigo de individuaj liberecoj, sed iom perpleksiĝas, ke la grave limigitajn aranĝojn kontraŭis neniu religia aŭtoritato. Se estis ebligita regula aliro en la vendejojn kun nutrovaroj (materialaj bezonaĵoj), kial do ne estis ankaŭ tio ebla en la lokoj de la religia kulto (spiritaj bezonaĵoj)?

Tamen, mi volas ĉi tie atentigi precipe pri la afero de pli ĝenerala karaktero rilatanta kunrespondecon de la tuta katolika komunumo pro akcepto de tiuj ĉi kondiĉoj, kvazaŭ ili estus neeviteblaj, aŭ kvazaŭ ne valorus strebi pri ilia ŝanĝo. Se ekzemple temas pri malpermeso de aliro por eksterlandanoj en la lokojn de religia kulto en Malajzio, ofte oni ripetadis kiel mantron, ke tio dependas de la normoj de la registaraj ordonoj, por kiuj en la angla lingvo alkutimiĝis speciala akronimo – SOP. Kunmiksiĝas ĉi tie akcepto de kruco per „sekvado de Kristo“ kaj devo respekti ordonon de ŝtato. Estas necese al ni memorigi, ke grandaj sanktuloj kiel Maksmilian Kolbe kaj Edith Stein mortis en naziismaj koncentrejoj, kie iliaj malliberigantoj „nur“ obeis la registarajn ordonojn.

La menciita punkto do koheras kun mantro de tiuj „registaraj restriktoj“ – SOP. Ni demandu, kiel ni reagus, se estus al ni dirite, ke dum nedifinita tempo pro iu kaŭzo, pri kiu decidus registaro, ni ne povos vidi niajn infanojn. Ĉu ni tion lasus nur tiel sen reago, sen levi la voĉon? Ĉu ni ne sentus, ke ni estas maljuste senigitaj de nia rajto vivi kun nia familio? Ĉu ni ne estus konsternitaj per doloro?

Nu. La respondo, kiun ni ĉiuj al tiuj ĉi demandoj nature portas en koro evidentigas, ĝis kiom estas bezonata al ni mizerikordo. Nia kredo estas tiom malriĉa, ke ni ne kapablas rekoni en Eŭkaristio vere tion la plej valoran, kion ni havas. Ĉu do la Eŭkaristio ne estas vera fundamento de nia kredo? Ĉu eble la ofero de la viva Dio, realiganta per ĉiu Eŭkaristio, ne estas unuanura fonto de la senco de niaj sentoj, eĉ de niaj agoj? Ĉu eble ne estas eblo mistere satiĝadi per la Korpo de Kristo, per la unusola kaj vera fonto de nia vivo?

Sen batalo ni rezignis pri tio, kio estas por ni la plej valora. Ni permesis, ke estu principe interrompita provizado de la spirita esenco de nia vivo, sen levi nian voĉon.

Se tiu ĉi kvaranteno alportis ion bonan, do estas tio konscio de tio, kiel ni estas kom-

patindaj kaj senmoraliĝintaj, tiel do ni povas ekrimarki etecon kaj labilon de nia kredo; ĝi estas tiel malforta, ke ni permesis al la mondo, ke ĝi perfortigu nin, sen ke ni rimarku, ke ni estas perfortigataj. Rekono de nia propra mizero estas granda graco, necesa por konvertiĝo, ke ni pli multe ekamu vivan Dion malsatante pri lia mistika Korpo.

Ni strebu, ke tiu ĉi konsciiĝo denove pli fortigu nian kredon!

*Aŭtoro (nask. 1978 en Verona, Italio) instruas ekonomion en Universitato en Kuala Lumpur, Malajzio; li estas aŭtoro de fakaj libroj kaj ankaŭ publicisto.*

*La artikolo estas aperinta en interreta taggazeto La Nuova Bussola Quotidiana, la 21-an de julio 2020.* ■

## KIO ESTAS FELIĈO?

Niaj du kvarjaraj filinetoj ĉiam al ĉiuj deziras por diversaj okazoj la samon: multe da sano kaj feliĉo. Kaj tiel mi ekinteresiĝis, kion ili sub la vorto feliĉo en tiu ĉi aĝo povas imagi. Lucinjo tuj sin esprimis: „La feliĉo? Nu ja, ke vi bonfartas.“ Janjo tion eksplikis al mi lapidare: „Kiam mi lin amas, do tial mi deziras al li feliĉon.“ Kaj mi konsciiĝis, kian veron havas tiu ĉi infano. Ĉar esti amata – tio certe granda feliĉo estas.

La feliĉon ni reciproke deziras, pri la feliĉo ni ĉiuj sopiras – sed kion ni tiucele mem povas fari, por ke ni alproprigu ĝin kaj precipe – por ke ĝi ne forlasu nin. Ja estas pri ĝi konate, ke ĝi kapablas esti tre ŝancelema. Se ni opinias kiel feliĉon gajnon en vetludo, do tia feliĉo certe estas ŝancelema. La monon mi elspezos kaj tempe el tio nenio restos. Mi estas konvinkita, ke la feliĉo, pri kiu ĉiu homo estece sopiras, estas la feliĉo el tute alia kategorio. Ĝi ne estas nur tiu ĉi pasema feliĉo, kiu agrabligas al ni momentojn sur tiu ĉi mondo. Tio estus tro malmulte. La homa koro (laŭ mi) sopiras pri la feliĉo definitiva. Pri la feliĉo, kiun al li neniam iu forprenos. Nek la homoj, nek cirkonstancoj, nek la tempo, ja eĉ ne la morto!

Kaj ke tiu ĉi feliĉo vere ekzistas, pri tio konvinkis min vico da pacientoj, mortantaj en hospico en tiel nomata fazo de repaciĝo. Tiuj laŭlitere ŝokas sian ĉirkaŭaĵon, kiam spite de ĉiuj malagrablaĵoj kunigitaj kun ilia kancero asertas, ke ili estas feliĉaj. Iuj pri tio ne parolas, sed oni tion kapablas ellegi el ilia vizaĝo. Kaj kiam oni komencas esplorserĉi pri tio, kiel estas ebla, ke ili tion sukcesis, fine oni ĉiam atingos la saman konkludon. Aŭ ĝi estas tial, ke tiuj ĉi homoj havas certecon, ke almenaŭ malnete ili plenumis la taskon, pro kiu ili en tiu ĉi mondo naskiĝis. Aŭ ili ne tute estas pri tio certaj (tiu ĉi kazo estas pli ofta), sed sufiĉe frue ili tion konsciiĝis kaj per pentofaro rebonigis. Ofte ili tion volonte rebonigus eĉ per iu konkreta faro, por kio ili bedaŭrinde ne plu havas tempon, eĉ ne bezonatan sanstaton kaj forton.

Sed kion por mia feliĉo povas fari mi persone, konkrete jam hodiaŭ? Ununuran. Laŭeble plej bone kaj plej sencohave travivi ĝuste tiun ĉi hodiaŭon. Poste morgaŭon ktp. Cetere ne gravas multe, kiom da tiujn morgaŭojn mi ankoraŭ havas antaŭ mi, sed kiel mi ilin travivos kaj per kio plenigos. Ekzistas la homoj, kiuj verdire vivas, kaj estas la homoj, kiuj nure ekzistas aŭ nur konsumas. Sed la vivo estas tro valora nur por ĝia travivaĉo aŭ konsumado. Ĉiu el ni havas en tiu ĉi mondo sian unikan kaj neanstataŭeblan mision kaj nia feliĉo estas rekte proporcia je ĝia plenumo. Ĉar tiu ĉi vera feliĉo, pri kiu eĉ ne la morto povas nin senigi, estas rekte proporcia al tio, ĝis kiu grado ni la mision realigos. Ĝis kiu grado ni plenumos nian ununuran taskon. ■

*(Transprenita el: www.vira.cz)*

# PREĜO POR MALRIĈECO KAJ HUMILECO

**Jesuo milda, malriĉa kaj korhumila, *liberigu min*:**

- **de sopiro** pri mono, pri kroĉiĝo al havaĵo, objektoj kaj pri ĉio, kio estas pasema; pri kroĉiĝo al propraj ideoj kaj volo,
- **de sopiro**, ke mi estu estimata kaj glorigata, ke mi estu amata kaj laŭdata,
- **de sopiro**, ke mi estu centro de atentemo kaj havu preferon antaŭ aliuloj,
- **de sopiro**, ke mi estu demandita pri la konsilo, (ĉar mi ĉion plej bone komprenas),
- **de sopiro**, ke oni konsentu kun miaj opinioj, ke homoj komprenu kaj agnosku mian bonan volon,
- **de timosento**, ke mi ne perdu iun objekton, kapablon aŭ talenton,
- **de timosento**, ke mi ne estu humiligata,
- **de timosento**, ke min homoj ne forpeladu de si kaj ne malestimu min,
- **de timosento**, ke mi ne estu senhonorigata, neglektata, suspektata kaj ridindigata,
- **de timosento**, ke oni ne rilatu min maljuste.

- **Por ke mi** ne ĉagreniĝu, kiam mi estos senigita de havaĵo, sano (korpa, psika), aŭ de la surtera vivo.
- **Por ke mi** neniam pensu, ke mi estas pli bona ol aliaj, ke mi ĉiam vidu unue trabon en mia okulo kaj nur poste nuran lignereton en la okulo de mia frato.
- **Por ke mi** vidu, ke mia ŝuldo rilate al Dio estas ĉiam pli granda ol tio, kion ŝuldas al mi mia frato.
- **Por ke mi** ne sentu esti superanta la aliulon, ke mi ne tolerus lian kritikon kaj ĉesus kun li interkomuniki.
- **Por ke mi** male estu pro la frateca kritiko dankema kaj ĉe konflikto mi ĉiam faru la unuan paŝon al repaciĝo.
- **Por ke mi** pere de malriĉeco kaj ĝia fratino humileco kresku en amo, ĉar „se mi ne havus amon, per tio mi nenion profitus.“
- **Por ke mi** kapablu vivi por aliuloj, „lavi al ili piedojn“, fari eĉ tiujn plej malaltajn laborojn.
- **Por ke mi** fariĝu ilo de la paco kaj repaciĝo; kreadu ĉirkaŭ mi pli fratecan mondon.
- **Por ke mi** ĉiam pli bone ekkonu, disvolvu kaj vivu franciskanan karismon.

**Sinjoro Jesuo Kristo, Filo de Dio, kompatu min pekulon!**
Enmetu, mi petas, en mian koron sopiron pri tio,

- por ke la aliuloj posedu pli multe kaj mi pli malmulte aŭ nenion,
- por ke la aliuloj povu esti pli multe amataj ol mi,
- por ke la aliuloj estu pli estimataj ol mi,
- por ke la aliuloj en la okuloj de ĉi tiu mondo kresku kaj mi malkresku, por ke la aliuloj estu elektitaj kaj mi restu flanke,
- por ke la aliuloj estu laŭditaj kaj mi restu neatentita, por ke la aliuloj en ĉio havu preferon antaŭ mi,
- por ke la aliuloj povu iĝi pli sanktaj ol mi, se mi nur iĝu tiel sankta, kiel mi devus esti laŭ via depratempa plano.

**Jesuo, donu al mi gracon, ke mi ĉiam pli malgrandiĝu, por ke Vi, Sinjoro, povu kreski** *(Joh 3,30)*, **esti pli amata kaj glorigata!**
**Jesuo, mi fidas al Vi! Amen.**

# DEK JAROJ POST LA GRANDA JUBILEO - LA CENTJARIĜO DE I.K.U.E. FONDITA LA 1-AN DE APRILO 1910 EN PARIZO

Antaŭ 110 jaroj en la 1-a de aprilo 1910 estis fondita Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. La fonda konferenco, kiun partoprenis 600 personoj kaj multaj reprezentantoj de tiamaj amaskomunikiloj kaj institutoj, okazis en la Katolika Instituto en Parizo.

Antaŭ dek jaroj, do en la centa jubileo de la fondo de IKUE okazis en Parizo la 63-a Kongreso de IKUE, kiu estis solena rememoro de la komenco de la ornanizita agado de la katolikaj esperantistoj kadre de la tutmonda esperantistaro, kiu spite de diversaj malfacilaĵoj daŭras ĝis nun.


La 63-a memorkongreso en la jaro 2010 okazis tuŝapude de la fama Baziliko Sacré Coeur en la urboparto Montmartre en la domo de la kongregacio de la Benediktaninoj de la Sanktega Koro. La inaŭgura sankta meso okazis en kripta kapelo de la apuda Baziliko, kiun celebris tri pastroj el Francio kaj Italio. Dum la kongreso estis rememoritaj ĝiaj fondintoj frunte de la pastro Emile Peltier. Krom ili per la oraj literoj enskribiĝis en niajn korojn karmemora pastro Duilio Magnani el Rimini, Italio, kiu estis vera motoro de la novtempa katolika E-movado.

Dum la kongreso kompreneble okazis multaj gravenhavaj prelegoj kaj vizito de almenaŭ kelkaj urbaj vidindaĵoj. Speciale grava estis vizito de la Kapelo de la Mirakla Medaliono en la strato Rue du Bac, kie troviĝas korpo de la sankta Katarina Labouré, al kiu dum la revelacio la Dipatrino transdonis la peton pretigi la miraklan medalionon. En tiea kapelo estis celebrita por la kongresanoj sankta meso, kiun celebris 5 pastroj kongresanoj.



Ni esperu, ke post la venko de la ekzistanta krizo ene de la IKUE-movado, Dio benos ĝin, por ke ĝi denove fruktedone ekaktivadu utiligante sian karan internacian lingvon. Tiucele ni preĝu kaj ne ĉesu esperi! ■






*Katolika Instituto de Parizo, kie okazis en la jaro 1910 Fonda Kongreso de IKUE*

# VIRTUALAJ TAGOJ DE I.K.U.E. - 14.-21.8.2020

## En la nuna jaro Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista festas sian naskiĝtagon

***NIA DUA JARCENTO: NI ALFRONTU LA DEFIOJN KUN KURAĜO, RESPONDECO, SINDEDIĈO, KONFIDO KAJ AKCEPTEMO***

Katolikaj esperantistoj, do ne nur IKUE-anoj, de la tuta mondo estis invititaj partopreni Virtualajn Tagojn de IKUE okazintaj pere de virtuala ilo ZOOM en la tagoj de la 14-a ĝis la 21-a de aŭgusto 2020. Gvidantino kaj organizantino de la virtualaj tagoj estis la prezidantino de IKUE fratino Marija Belošević. Ŝi starigis programon de la oktaga virtuala renkontiĝo, kiun partoprenis katolikaj esperantistoj el diversaj lokoj de la mondo. Gravas tuj aldoni, ke la tagoj okazis inter la festotagoj de du ĉielaj patronoj de IKUE: s-ta Maksimiliano Kolbe kaj s-ta papo Pio la Deka.

La programo de la Virtualaj Tagoj estis diversvaria. Ĉiu tago de la aranĝo komencis per medito koncernanta la Evangelion de la tago gvidita de kelkaj sacerdotoj – esperantistoj – sac. Albert Reiner, fra Patryk M. Rygiel, OFMConv kaj precipe sac. Serhij Prudko. Poste preskaŭ ĉiutage sekvis muzika ekzercado gvidata de sac. Albrecht Kronenberger. Sekvis dum kelkaj tagoj programo de fotoekspozicio prezentanta kroatajn sakralajn konstruaĵojn pere de Željko Grganić el Kroatio kaj fotoekspozicio pri la s-ta papo Johano Paŭlo la Dua (aŭtoroj: Marija Belošević kaj Marko Puškarić el Kroatio). Kompreneble ne mankis ankaŭ programo koncerne la pandemion de KOVIM -19 prezentita de D-ro Gabor Markus kaj sufiĉe longa diskuto pri la aktuala situacio en diversaj lokoj de la mondo. Al la temo valoran kontribuon donis Alberto Garcia Fumero el Kubo, prezentante la agadon de la Eklezio dum ĉi-tiu malfacila tempo.

Ĉefa programo de la dimanĉa posttagmezo estis dediĉita al rememoro pri la sankta papo Johano Paŭlo la Dua sub titolo: La papo kaj esperantistoj. Dum ĝi povis la virtuale ĉeestantaj personoj esprimi siajn impresojn el renkontiĝo kun la papo.

Pri la agoj kaj defioj de la katolika eklezio en brazila Amazonio raportis Vitor Luiz Rigoti Dos Anjos el Brazilo kaj pri la okjara petveturinta mondvojaĝo Bruno Robineau el Francio. Robineau same prezentis pilgrimon kun la familio al Santiago de Compostelo. Pripensi pri la valoroj de la nuna tempo, per prelego „Pasio por la vivo, el valoroj al la Valoro, la demando pri la valoroj“ la partoprenantojn instigis Milton Paulo de Lacerda el Brazilo.

Ankaŭ estis krom la papo Johano Paŭlo la Dua memorigitaj ceteraj ĉielaj patronoj de IKUE: s-ta Maksimiliano Maria Kolbe, beata Tito Brandsma kaj sankta papo Pio la Deka. Nu kaj tio instigis enprogramigi ankaŭ pritrakton de la nuntempa grava kaj aktuala temo: IKUE hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ kaj la ceterajn informojn koncerne de IKUE. La unuan fojon oni provis analizi la situacion de IKUE per FLAM-analizo.

Indas mencii ankaŭ prelegon de Pavol Petrík pri P. Mikuláš Lexman, OP, pastro kaj esperantisto de Slovakio. Same oni menciis aliajn esperantistojn martirojn de la totalitaraj reĝimoj de la dudeka jarcento.

Ĉiutaga antaŭlasta programero estis komuna rozaria preĝo. Estis tio kortuŝa travivaĵo, kiam esperantistoj el diversaj lokoj de la mondo samtempe sin turnas per la rozaria preĝo al la ĉefa patronino de IKUE – Nia Sinjorino de la Espero. Ni do esperu, ke la ĉielaj patronoj de IKUE efike helpos revivigi kaj revigligi ĝin, se ni fide nin turnos al

ilia tiucela propeto.

Kaj rememore pri la IKUE-kongresoj estis projekciitaj prezentaĵoj faritaj de Miloslav Šváček pri la kongresoj okazintaj en Parizo, Francio, en Kalwarija Zebrzydowska, Pollando, en Zagrebo, Kroatio, en Pécs, Hungario, en Velehrad, Ĉeĥio, en Nitra, Slovakio kaj en Olomouc, Ĉeĥio. Tiuj, kiuj deziras akiri ne nur tiujn ĉi prezentaĵojn, sed eĉ aliajn, bv. vin turni al M. Šváček [m.svacek@seznam.cz].

Indas ankaŭ mencii koncerton de Perla Mielo el Hungario sur perkutinstrumentoj kun piana akompano de Andrea Berg. Gravan kontribuon al la vespera programo donis Edvige Ackermann kaj Elda Doerfner el Italio, kiuj aranĝis du poezivesperojn. La unua estis dediĉita al sac. Ivan Golub (1930-2018) kaj la dua ĝenerale al la origina kaj tradukita poeziaĵoj kun la religiaj temoj. Al la partoprenantoj sian verkon – la meson komponitan honore al IKUE – prezentis Christoph Dalitz el Germanio. Ĉe la fino, kiel dum realaj aranĝoj, ĉiuj kontribuis al la programo de la amuzvespero.

Kvankam jam klare dirite tuj ĉe la komenco, ke la virtuala aranĝo nek anstataŭas, nek pretendas esti nomita „kongreso“, la partoprenantoj unuanime proponis, ke ĝi trovu sian lokon en la listo de la kongresoj. La partoprenantoj alte taksis la enhavon de la aranĝo. Krome, tio estis bona okazo almenaŭ virtuale revidi konatulojn kaj ekkoni plurajn novajn personojn. Kaj jes, ni ne forgesu aldoni, ke ĝi iasence al pluraj malfermis tute novan, kvankam virtualan mondon kaj la tagoj estis bona okazo trejni uzante la novan ilon.

Konklude oni povas diri, ke estas planataj ĉiumonataj virtualaj renkontiĝoj. La interesatoj pri la partopreno en ili, bv. vin anonci ĉe IKUE reto: ikue.reto@gmail.com por ricevi pluajn informojn. ■

*Miloslav Šváček, Marija Belošević*

## KIU ESTAS JESUO POR MI

La Vorto fariĝinta karno.
La pano de vivo.
La viktimo, kiu oferas sin sur la kruco pro niaj pekoj.
La forofero fordonata en la sankta meso
pro la pekoj de l´ mondo kaj miaj personaj.
La vorto, kiun mi devas diri.
La vojo, kiun mi devas laŭiri.
La lumo, kiun mi devas ekbruligi.
La vivo, kiun mi devas travivi.
La amo, kiu devas esti amata.
La ĝojo, kiun ni devas kundividi.
La ofero, kiun ni devas oferi.
La paco, kiun ni devas semi.
La pano de vivo, kiun ni devas manĝi.
La malsatulo, kiun ni devas satigi.
La soifanto, kiun ni devas sensoifigi.
La nudulo, kiun ni devas vesti.
La senhejmulo, al kiu mi devas proponi ŝirmejon.
La solulo, al kiu ni devas havigi kunulecon.
La neatendito, kiun ni devas akcepti.
La leprulo, kies vundojn ni devas lavi.
La almozulo, kiun ni devas sukuri.
La drinkemulo, kiun ni devas aŭskulti.
La invalido, kiun ni devas helpi.
La novnaskito, kiun ni devas akcepti.
La blindulo, kiun ni devas gvidi.
La mutulo, al kiu ni devas pruntedoni nian voĉon.
La kriplulo, kiun ni devas helpi en piedirado.
La prostituitino, kiun ni devas malproksimigi el la danĝero
kaj plenigi per nia amikeco.
La malliberulo, kiun ni devas viziti.
La pliaĝulo, kiun ni devas servi.
Jesuo estas mia Dio.
Jesuo estas mia edzo.
Jesuo estas mia vivo.
Jesuo estas mia ununura amo.
Jesuo estas ĉio por mi.
Jesuo, por mi, estas la unika. ■

*Patrino Tereza*

# LA KVINA TELERO

Mian neantaŭviditan vigilian teston pri homeco mi plenumis apenaŭ mezbone. Estas vero, ke plej ofte embarason kaŭzas al ni niaj propraj infanoj kaj ĝuste ili plej rapide malkaŝas nian malperfektecon.

Ĉiujare, kiam miaj filinoj aranĝis antaŭkristnaskan vespermanĝan tablon mi memorigis al ili kun nobla patoso:

- Memoru pri la tradicia aldona telero por neatendita gasto! Ĉiam povas aperi iu soleca aŭ malfeliĉa kaj Kristnasko estas ja festo de amo al kunulo!

- Aha – ili diris kun komprenemo kaj starigis kvin manĝilarojn sur la tablon: por panjo, por paĉjo, por ili mem kaj por tiu iu.

Sincere dirite tiu kvina telero ĉiam restis malplena. Jen bela simbolo. Tiaman jaron, 1986, ŝajnis ke estos same, ĉar kial povus esti alie? Kiu fremdulo kuraĝus frapi ies pordon dum la vigilia vespero, la vespero rezervita por la familia intimeco? Jes, iun fojon venis najbarino kaj demandis, ĉu mi ne povas doni al ŝi tri pecetojn da fiŝo, ĉar ŝi tiom ekŝatis sian karpon, ke ŝi ne povas ĝin mortigi (... ĝi alfluas, aŭdante mian voĉon kaj levas faŭketon por karesi ĝin...) – diris ŝi kortuŝita. Do mi donis al ŝi rapide tri porciojn, ĉar rakonto pri la spirita vivo de ŝia karpo malbone influas mian propran spiritan vivon. Ne hazarde mi plej ŝatas la sanktulon Francisko el Asizo.

Kasia jam aranĝis la tablon, la edzo bongustigis brasikon, ravioloj estis jam preskaŭ finkuiritaj, sed ie malaperis Małgosia. Ŝi havis nur taskon promenigi hundon, sed la hundo kuŝis sub la tablo kaj Małgosia malestis. Ĝuste kiam la ravioloj estis finkuirantaj, iu frapis la pordon.

- En tia momento? – ekkoleriĝis la edzo.

- Jes, en tia momento? – mi ripetis.

Kasia malfermis larĝe la pordon. Sur la sojlo staris ridetanta Małgosia kaj … nekonata, konfuzita maljunulino.

- Kiu ŝi estas ? – flustre demandis la edzo kaj la pli aĝa filino.

- Jes, kiu? – mi ripetis, sed Małgosia jam tiris la nekonatulinon en la loĝejon, senvestigante ŝin el dika tuko, malnova mantelo kaj du puloveroj.

- Ankoraŭ ŝuojn mi demetos por ne ko-



tigi plankon – diris la maljunulino.

- Momenton – mi ekkriis kun kreskanta kolero. – Małgosia, kiu estas tiu sinjorino?

- Tiu sinjorino estas por la kvina telero – diris entuziasme Małgosia.

- Por la kvina telero? – ripetis la edzo kun brilo de komprenemo en la okuloj.

- Sed la kvina telero ĉiam staras malplena – konscie rimarkis la pli aĝa filino.

- Ĝi estas malplena, ĉar ĝi atendas – rompis al ŝi Małgosia, demetante la duan ŝuon el la piedo de la gasto. Sur la piedoj de la maljunulino estis nun nur truhavaj ŝtrumpoj, ne kulpigantaj pri pureco.

Mi eksentis, ke interne mi bolas ne malpli ol kuirataj ravioloj kaj kiam la misorientigita edzo kaj ne malpli konsternita Kasia irigis la maljunulinon en ĉambron, mi entiris Małgosia-n en la kuirejon.

- Kion vi faras? - mi siblis minace. – Vi venigas nekonatan personon en la hejmon; kiu scias ĉu ŝi ne estas ŝtelistino? Kaj kiam vi tion faras?! Dum la vigilia vespero?! Ĉu vi freneziĝis?!

- Sed la kvina telero ... – senhelpe flustris Małgosia. – Vi ĉiam diris, ke ĝi atendas iun malfeliĉan kaj solecan, kaj tiu maljunulino vere estas soleca kaj malfeliĉa! Mi pruntis ŝin el maljunulejo speciale por ni!

- Vi pruntis?! Jesuo ... mi komencis kolere... kaj mi eksilentis. Subite mi ekkonsciis, ke post kelkaj horoj, noktomeze, mia hundo kaj du katoj komencos interparoli homvoĉe kaj mi grumblas! Mi grumblas pri la kvina telero, pri kiu mi tiom debatas, kiam komenciĝas la aranĝo de la vigilia tablo. Mi suspiris profunde kaj mi finis la frazon.

– Jesuo ... do, vi bone faris.

Dum la divido de oblato la maljunulino rakontis pri siaj filinoj kaj filo, kiuj ie ankaŭ dividas inter si oblaton, sed ili ŝatas havi ĉe la tablo neniujn maljunulinojn – nek siajn, nek fremdajn, ĉar maljuneco detruas ilian bonan animstaton. Kiam ni manĝis raviolojn kun ruĝa barĉo, ni eksciis kiamaniere okazadis vigiliaj vespermanĝoj en la orientaj randoj de Pollando. Tie dum vigilia vespero altabliĝadis dek ses personoj el kvar generacioj. Pli poste, manĝante fiŝon, ni eksciis, ke nia gasto estis instruististino, sed „ĉiam venas tago, kiam bezonas vin nek propraj, nek fremdaj infanoj".

- Nu kiel? Kaj ni? – demande diris Małgosia kaj iel strangmaniere mi eksentis min pli certe.

Dum la manĝado de brasiko kun fungoj la maljunulino rakontis pri la edzo (... li tro ŝatis virinojn, sed almenaŭ mi ne enuiĝis kun li...), kaj ĉe konsumado de la fromaĝkuko ŝi petis kvar aldonajn pecojn por siaj kunloĝantinoj, kiujn neniu pruntis.

Poste, kiam la filinoj akompanis la maljunulinon ĝis ŝia loĝloko, la edzo lavis la vazaron, la hundo kaj du katoj diskrete interparolis homvoĉe, mi ekmeditis pri la neatendita testo pri homeco, kiun mi plenumis apenaŭ mezbone... Mi meditis pri tiu stranga limo inter teoria kaj reala amo de la kunulo. Ĉar plej facile estas meti la kvinan teleron kaj kalkuli je tio, ke ĝi restos malplena – jen bela simbolo.

Do mi deziras al vi neatenditan gaston dum la vigilia vespero kaj batalu kun si mem, kiel mi iam. Kaj ekparolu fine homvoĉe. ■

*Verkis Dorota Terakowska*

*El la pola lingvo tradukis Dorota Burchardt*

„La sankta meso estas kuracilo por resanigo de malsanoj kaj ofero por pago de kulpoj.“ (s-ta Cipriano)
„Celebro de la sankta meso havas tian valoron, kiun havas la surkruca morto de Jesuo.“ (s-ta Tomaso Akvina)
„La homo devas tremi, la tero devas skuiĝi, la tuta ĉielo devas emociiĝi, kiam suraltare en manoj de sacerdoto troviĝas la Dia Korpo.“ (s-ta Francisko el Asizo)

# ĈEESTU, FIDULOJ, ĜOJE TRIUMFANTAJ




2. Li, Dio el Dio, Lumo el la Lumo,
kaj tamen naskita el virgulin´.
Jen Dio vera, Die generita! Alkuru ...

3. Vi, aroj anĝelaj, ĥoroj de l´ sanktuloj,
jubile ekkantu, laŭdante Lin:
«Gloro al Dio en supera alto!» Alkuru ...

4. Do ame ni danku al la Dia beno,
pro kies naskiĝo solenas ni.
Vorto eterna nun fariĝis karno. Alkuru ...



**Gracoplenan Kristnaskon kaj Di-benitan Novan Jaron 2021 al la legantoj de la revuo Espero Katolika deziras la Estraro de I.K.U.E.**